Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2016-32 sendita el Modra-Harmónia, Slovakio, la 19an de novembro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo kun fontagnosko: EKO-komuniko de UEA

# Jaro de la Lernanto kaj pliaj ekzemploj de AMO

Seso da ĉefe retrilataj prezentaĵoj tra la du komencaj tagoj de la aranĝo KAEST formis la enhavon de la 28a AMO-seminario, okazigita en Modra-Harmónia, Slovakio. La malferma aranĝo de la seminario estis prezentaĵo kun grupdiskutoj pri la Jaro de la Lernanto. La lumbildoj de tiu prezento skizas la celojn kaj planojn de la jaro, kune kun sugestoj por lokaj grupoj kaj landaj asocioj, kiel kunlabori. Fine de la prezento, aperis tabelo de la 18 lokoj en 14 landoj en ĉiuj kontinentoj, kie estos aŭ estis markata la Jaro. Tiu prezentaĵo aperos en la baldaŭ malfermota retejo de UEA, <aktivulo.net>. Ĝi estas petebla de la aŭtoro ĉe <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>.

La plimulto de la 80-minuta sesio estis dediĉita al du-grupa diskutado kun reraportado de temoj pri la kuraĝigo de retkursaj finintoj. Jen resumo pri la diskutoj:

### Grupo 1: Kiel Stimulu Plustudadon?

- La projekto EKPAROLU de <edukado.net> kuraĝigas pli varian plustudon, kune kun uzo de rektaj homaj ligoj en la reto, per sistemo de mentoroj: "geonkloj" kaj "genevoj". Tiuj kontaktoj povas okazi per regulaj skajp-kunvenoj.
- UEA aŭ ligitaj projektoj povos helpi pri kontaktoj al novuloj. En tiuj kontaktoj, ne hezitu rakonti personajn spertojn, kial oni mem ekinteresiĝis, kiumaniere uzas la lingvon.
- La graveco de rimedoj (mono) por signife agadi. Aliflanke la reto malfermas preskaŭ senpagajn eblojn, kiuj ne ekzistis en pli fruaj epokoj. Eo ja ne povas proponi al lernantoj grandajn eblojn por financa gajno, necesas proponi aliajn neekonomiajn valorojn.
- Riske estas uzi trudajn reklamojn; ligu E-on kun aliaj celoj kiel ekzemple plur-lingvismo kaj la utilo lerni lingvojn aliaj ol nur la angla, gravas ofteco de vidigoj.



### Grupo 2: Kiel altiri homojn al la komunumo?

Regule okazigi distrajn aranĝojn kaj alvoki al retkursanoj partoprenu. Praktika ekzemplo estas la ĉiumonataj ludotagoj de la neder-

landa junularo NEJ al kiuj venas kursfinintoj, ekzemple de Duolingo. La etoso estas senstreĉa kaj amuza, do bonveniga – tamen la novuloj spertas la lingvon funkciantan. Per subvencioj NEJ sukcesas kovri la vojaĝkostojn de enlandanoj – por la unua vizito senkondiĉe, por pliaj vojaĝsubtenoj, oni devas membriĝi en NEJ kaj sekve resti en kontakto kun la organizo.

- Trovi homojn, kiuj interesiĝas pri Esperanto en sociaj retejoj kaj persone kontakti ilin.
- Uzu ludojn por allogi junulojn.
- Helpi neriĉajn homojn per ekonomia subteno por partopreni la E-vivon.
- Starigi kaj proponi konkretajn servojn.
- Allogi idealismajn homojn per substreko de la interna ideo, ekzemple laŭ la Manifesto de Prago.




Fotoj el la reraporta fazo. Fotoj: SMG



La ĉeftemo de KAEST kaj AMO estis: 'Avantaĝoj kaj Obstakloj de Moderna Komunikado'. En ĉi tiu komuniko restas spaco por prezenti nur du el la multaj pliaj programeroj.

## Petro Baláž pri 'Vidigo de Esperanto en la Reto' (grupdiskuto):

Vikipedio

- Aldonu E-paĝojn, precipe al unulingvaj paĝoj.
- Aldonu en Eo bildklarigojn al siaj fotoj.

Aliĝu al parencaj asocioj kaj proponi la aldonon de iliaj paĝoj en Eo.

- Risko estas la eblo por ili scii la modestan nombron da vizitoj al la E-paĝaro.

Aldoni E-lingvajn subtitolojn al filmoj.
Kapti la atenton de ĵurnalistoj – i.a. de retaj komunikiloj.

- Gravas prezenti tekstojn pri temoj, kiuj interesos ilin kaj la legantojn.
- Ne ĉiam nur proponu kaj propagandu Esperanton en izolo.

Retejoj estu adaptitaj por ebligi spektadon en poŝtelefonoj kaj similaĵoj.
Faru literaturajn kaj fakajn tradukojn inter du naciaj lingvoj pere de Esperanto.

La prezentanto skizis tri strategiojn por plenumi la celon:

1. Starigi propran Esperantan projekton
2. Aldoni Esperanton al la projektoj de aliaj
3. Krei proprajn E-projektojn kiuj povos utili ankaŭ al ne-esperantistoj.

Fine, estis prezentitaj du ekzemploj de multlingvaj retejoj, kie estas aldonitaj Esperanto: FORVO kaj Tatoeba, kie Esperanto atingis la duan rangon pri la nomo de tradukitaj vortoj kaj esprimoj (duona miliono). Tria prezentaĵo (ekzemplo de la tria punkto) estas la lastatempe relanĉita kaj modernigita multlingva servo 'Lernu.net'. Unu el la modernigoj estis la aldono de la eblo vidigi la paĝaron en poŝtelefonoj kaj tiaj iloj, kiuj ebligas al personoj sekvi la kursojn kaj apogajn servojn dum vojaĝado per publika transporto.

## Kubo F:  Uzado de Vikipedio

Post prezento, sekvis grupdiskuto kun interesa metodiko. Jen notoj pri la realigo:

Kvar grupoj, granda paperpeco por ĉiu, kvin minutoj por diskuti. Ĉiu grupo ricevas alian temon. La grupo kolektive kreas notojn pri la diskutoj. Post tiu diskuto, la paperoj rondiras al la sekva grupo, kaj unu homo el la transdona grupo resumas por la ricevanta grupo la rezultojn de la diskuto. Denove, sekvas kvin-minuta diskuto pri la ricevita temo. Do, ĉiu grupo traktas du el la kvar temoj – skribe kaj parole. Kun plia tempo, eblus, ke ĉiu grupo traktu ĉiujn kvar temojn. Fine, unu membro de ĉiu grupo resumas la diskuton pri la laste ricevita temo. Atentinda diskutiga taktiko. Ni havas spacon prezenti nur unu el la kvar temoj:

***Kial homoj hezitas kontribui al Vikipedio?***

- Oni timas, ke la laboro bezonos tro altajn teknikajn konojn
- Manko de tempo kaj neniu pago por la laboro
- Devo cedi kopirajton pri uzataj bildoj
- Risko, ke aliaj intervenos malutile en kontribuoj.

La nivelo de KAEST estis admirinde alta, ofte kun viglaj diskutoj inter komputike kapablaj agantoj. Pri la tuto de KAEST atendu raportojn de la organizantoj. Pri la cetero de AMO ni provos raporti.

Vortoj: 870

==========
Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.